

Platena ringo de Johano Amoso Komenský

Karaj geamikoj!

La dekkvinan de novembro ĉijare pasos tricent kvin jaroj de la morto de Johano Amoso Komenský. Ĉi okaze mi permesas al mi mencii ion el lia vivo, plue mencii historion de lia platena ringo kaj fine ion pri Gerta Figulusová, kiu estas rekta posteulino de Komenský, jam en la naŭa generacio kaj kiu estis siatempe en Prago bona amikino de mia familio.

A) Komenský kaj lia vivo

Plej unue kelkajn notojn pri la personeco de Komenský.

Por plisimpligi la aferon kaj el praktikaj kaŭzoj ni uzas la formon "Komenský", kiel ĝi estis ĝis nun kutima malgraŭ tio, ke la Lingva Komisiono de ĈEA rekomendis uzi la formon "Komenio". Laŭ nia opinio ĉi tiu novaĵo ankoraŭ ne enviviĝis kaj ne estis ĝenerale akceptita.

La nomon "Amoso" akceptis Komenský kiel sian duan antaŭnomon. Ĉi tiu vorto, prenita el la latina vorto "amosus", signifas "karulo", "precipe kara".

Komenský estis elstara kultura fenomeno de la XVII. jarcento. Li estis ĉiufake klera, li posedis ĉiujn sferojn de tiama homa scienco. Li estis la unua, kiu atentigis, ke la lingva diverseco estas la ĉefa obstaklo de la kompreniĝo inter nacioj kaj pro tio necesas eltrovi artefaritan lingvon ĝenerale uzotan de la tuta homaro. Lia verko enhavas proksimume 250 skribaĵojn. Tamen ĉiuj ne estis ĝis nun trovitaj. Nur fine de estinta kaj dum tridekaj jaroj de nuna jarcentoj estis en Germanio kaj Pollando malkovritaj ĉeĥaj kaj latinaj skribaĵoj. Eĉ antaŭ mallonga tempo oni trovis en Nederlando ĝis nun ne konatan skribaĵon de Komenský.

Lia verko estas tre ampleksa. Precipe kiam ni konsciiĝas, ke Komenský kreis en terura tumulto de la tridekjara milito. Plimulto de liaj skribaĵoj dufoje forbrulis, unuafoje en Fulnek, duafoje ĉe la detruigo de Lešno. Komenský savis sin trifoje antaŭ malamikaj soldatoj; ĉiam lastmomente, streĉante ĉiujn fortojn. Li kaŝis sin ĉe ni, en ĉeĥaj landoj, sep jarojn kaj en eksterlando 42 jarojn, entute 49 jarojn; peladita de loko al loko, plej frue sola, poste kune kun sia kelknombra familio. Li vivis dum longaj jaroj tre ofte en mizeraj, angoraj rilatoj, en senĉesa timo kaj zorgo pri tio, kion alportos morgaŭa tago. Ekzemple laŭ unu versio li kaŝis sin en kava trunko de granda tilio, kie li laboris, eĉ dormis.

Do oni ne povas ekskludi, ke pluaj skribaĵoj de Komenský estos ankoraŭ malkovritaj.

Kiajn dezertigojn kaŭzis la tridekjara milito ĉe ni, oni povas prijuĝi el tio, ke antaŭ ĉi tiu milito havis Bohemio tri milionojn da loĝantoj kaj post ĝi nur unu milionon okcentmil da loĝantoj. Pli ol kvardek procentoj de bohemia loĝantaro aŭ pereis aŭ transloĝiĝis eksterlanden. En Olomouc restis post la milito nur 1.700 el 30.000 da loĝantoj antaŭ ĝi. Urboj kaj vilaĝoj en ĉeĥaj landoj plejparte bruldetruigis. La restinta loĝantaro konsistis el kompatindaj defrapitaj home, anime kaj sociale. Kaj en tia medio Komenský kreis verkon, en kiu li malproksime antaŭiris sian tempon kaj kiu estas ankoraŭ hodiaŭ aktuala kaj uzebla.

Signifon de Komenský kaj de lia verko pritaksis ankoraŭ dum lia vivo fama germana filozofo G. W. Leibniz, pli juna samaĝulo de Komenský, kaj multaj aliaj sciencistoj kaj ŝtatumuloj. Renomo de liaj ideoj trapenetris dumtempe en ĉiujn kulturajn landojn. Pli poste alia signifa filozofo deklaris, ke Komenský estas "apostolo de homaro"; pri liaj opinioj li diris: "Piaj deziroj de ĉi tiu speco ne flugas al lumo. Ili restas sur la tero kaj fariĝas videblaj faktoj, kiam venos ilia tempo." Societoj, kiuj esploras pri la vivo kaj verko de Komenský, troviĝas preskaŭ en ĉiuj ŝtatoj de la mondo. Liajn meritojn pri homa kulturo agnoskis en la jaro 1956 ankaŭ UNESCO. Ĉe ni en Prago ekzistis t.n. "Arkivo por esploro pri la vivo kaj verko de Komenský", kiu en la jaro 1967 ŝanĝiĝis en internacian revuon nomatan "Acta Comeniana".

Pri tio, kie Komenský naskiĝis, regis ankoraŭ antaŭ nelonge malcerteco. Tri lokoj aspiris pri honoro esti lia naskiĝloko: Komňa, Nivnice kaj Uherský Brod. Tio rememorigas al ni la antikvan Grekujon, kie sep urboj kverelis pri la naskiĝloko de poeto Homeros. Tiu disputo estas nun ĉe ni espereble decidita. Modernaj historiistoj pruvis konvinke, ke la naskiĝloko de Komenský estas

Nivnice. Plue estas sendispute, ke lia patro devenis el Komňa kaj kaj ke Komenský komencis subskribi sin laŭ li. Komenský, latine Comenius. Fine estas sendispute, ke Komenský pasigis sian infanecon kaj parte ankaŭ junecon kun siaj gepatroj kaj kvar pli aĝaj fratinoj en Uherský Brod. Tie ambaŭ liaj gepatroj mortis kaj estis enterigitaj, kiam Komenský estis dekdujara. Do ĉiuj tri lokoj havas proksiman rilaton al Komenský.

Estas konate, ke Komenský mortis la dekkvinan de novembro 1670 en Amsterdamo, en sia lasta rifuĝejo, kaj ke li la sepan tagon poste estis entombigita en valona preĝejo en Naarden, proksimume dudek kilometrojn oriente de Amsterdamo. Sed oni longe ne povis trovi lian tombon. La preĝejo en Naarden estis pli poste ŝanĝita en kazernon kaj la tero super la tomboj trafaliĝis. Nur per komuna laboro de ĉeĥaj kaj nederlandaj sciencistoj estis la tombo de Komenský, sed nur en la jaro 1929, malkovrita kaj indece aranĝita.

Komenský trifoje edziĝis.

Lia unua edzino estis Magdalena Vizovská, devenanta el Zábřeh, duonfilino de urbestro de Přerov. El ĉi tiu edzeco naskiĝis du filoj, sed post la trudita forkuro de Komenský ĉiuj tri – patrino kaj ambaŭ filetoj – pereis baldaŭ je pesto, kiun fremdaj soldatoj altrenis en Moravion. Komenský tiel perdis tutan sian familion.

En ekzilo en Brandýs nad Orlicí li post kelkaj jaroj duan fojon edziĝis nome al Dorota Cyrilová, kiu ĉi tie pasigis la ekzilon kun sia patrino. Ŝia patro estis episkopo de Unuiĝo de Fratoj (Jednota Bratrská) kaj metis en tiu funkcio ĉeĥan reĝan kronon sur la kapon de kontraŭreĝo Frederiko Falca (ĝuste: Palatinata). Dorota mortis post dudekkvarjara geedzeco en Lešno en la jaro 1648. El ĉi tiu geedzeco naskiĝis kvin infanoj, kvar filinoj kaj unu filo.

Post unu jaro Komenský trian fojon edziĝis. Lia edzino fariĝis Jana Gajusová, ĉeĥino kaj ankaŭ elmigrantino. Ŝia patro estis iam paroĥestro de Unuiĝo de Fratoj en Týn nad Vltavou, forlasis Bohemion kaj transloĝiĝis en Nederlandon. Jana volonte prenis sur sin zorgon pri Komenský kaj tuta familio. Ŝi transvivis sian edzon.

Kiam Komenský en akra vintro en januaro 1628 kun sia familio kaj kun multaj amikoj kaj samkonfesiuloj forlasadis sian patrujon, forkuradis kun li eksterlanden ankaŭ dekjara knabo nome Petro Jablonský-Figulus, kiun Komenský protektis iam kiel kvarjaran orfon. Lia patro estis ankaŭ pastro de Unuiĝo de Fratoj kaj devenis el Jabloň en la regiono Chrudim. Latina vorto "Figulus" signifas ĉeĥe "hrnčír", esperante "potisto". Tiu ĉi familio vivas ĝis nun en Orientbohemia. Sur la konata bildo de profesoro Liebscher "Komenský adiaŭas sian patrujon" estas videble, kiel Komenský konsolas plorantan malgrandan knabon. Oni diras, ke tio estas Petro Jablonský-Figulus. Tiu malpli frue post studoj en Lešno, kie li vivis proksime de Komenský, entreprenis variajn vojaĝojn, ĝis li ekloĝis portempe en Anglujo. Tie trafis lin post kelkaj jaroj Komenský ĉe vizito de siaj anglaj amikoj. De ĉi tiu tempo Figuluseĉ ne moviĝis de sia mastro kaj protektoro; ĉien lin akompanis dum liaj vojaĝoj kaj estis lia fidela kunlaboranto.

Poste Figulus fariĝis rekte membro de familio de Komenský. Li edziĝis la deknaŭan de septembro 1649 al la tria filino de Komenský – Alžběta. La fianĉino estis tiam deknaŭjara kaj Figulus tridekunjara. Ĉi-okaze Komenský donacis al sia filino multvaloran ringon, kiu laŭ lia deziro estis por ĉiam restanta en la familio kaj estis heredota de plej juna filo el la branĉo de Figulus kiel memoraĵo je la perdita patrujo. Ĉi tiu ringo hodiaŭ – post 325 jaroj – ankoraŭ ekzistas. Siatempe ĝi estis detale priskribita en la preso ("Lidová demokracie" la 23-an de marto 1970). Permesu, ke mi prelegu al vi tiun artikolon en ĉeĥa lingvo¹:

"Ve středu prstenu nahoře je umístěna korunka zdobená lípovými lístky představující korunu království českého. Střed tvoří dva ploché diamanty broušené do obdélníkových tvarů, světlezelené barvy, představující dvě manželská srdce. Kolem dokola srdcí je perlovec z drobných zrníček

1"En la mezo de la ringo estas supre lokita krono ornamita de tiliaj folioj reprezentanta kronon de la bohemia reĝlando. La mezon formas du plataj diamantoj, tajlitaj al rektangulaj formoj, de helverda koloro, prezentantaj du geedzajn korojn. Ĉirkaŭ la koroj estas ŝnureto el grajnetoj de plateno. Super la koroj estas enkrustita turnebla diamanto, kiu simbolas Dian okulon, gardantan la fidelecon de ambaŭ geedzoj. Sur ambaŭ flankoj estas du kaj du etaj diamantoj, kiuj reprezentas kvar infanojn el la dua geedzeco de Komenský. Sur ambaŭ perpendiklaj flankoj estas ankoraŭ etaj diamantoj signifiantaj infanojn el la unua edzeco. Sub la kunigitaj koroj estas ankoraŭ miniatura elstaro kun unu diamanto. La ringo mem estas masiva kaj el plateno." (tr. M. Malovec)

platiny. Nad srdci je zasazen pohyblivý otáčivý diamant, který symbolizuje boží oko, hlídající věrnost obou manželů. Po obou stranách jsou dva a dva menší diamanty, které mají znázorňovat čtyři děti z druhého manželství J. A. Komenského. Po bocích je pak ještě z každé strany po jednom diamantu a ty prý znamenají dvě děti z prvního manželství J. A. Komenského. Pod spojenými srdci je pak ještě malý výběžek s jedním malým diamantem. Obroučka prstenu je masivní a vše na prstenu (mimo diamantů) je vyrobeno z platiny."

B. Posedantoj de la platena ringo

1) Ĉe la transdonado kaj kaŝado de la ringo oni ĉiam zorgis pri tio – laŭ deziro de Komenský –, ke la posedanto ĝin ne forvendu eĉ se li troviĝus en la plej granda mizero. Temis pri tio, ke la ringo restu en la familio kaj ke ĝi estu transdonita – kiel eble – al la plej juna filo de la sekvanta generacio. – Edzinoj de la posedantoj el la unua ĝis sesa generacio estis ĉeĥinoj, posedantoj el la unua ĝis sesa generacio estis pastroj de Unuiĝo de Fratoj. Kelkaj el ili okupadis krom tio variajn publikajn funkciojn. Ekzemple unu el ili estis urba notario kaj urbestro. Posedanto de la ringo el la sepa generacio estis kuracisto. Ni citas ĉi tie nur tiujn posteulojn de Komenský, kiuj posedis la ringon. Alie estis pli multe da posteuloj de Komenský; sed tiuj la ringon ne posedis. Kelkaj el ĉi tiuj posteuloj de Komenský estis ankoraŭ eminentaj viroj. Ili elstaris kiel sciencistoj kaj verkistoj. Unu el ili estis eĉ prezidanto de la reĝa akademio de sciencoj en Berlino, kortega predikanto, episkopo de la Unuiĝo de Fratoj, eksperto de sciencaj lingvoj. Ĉiuj konsciis, ke ili etas posteuloj de fama viro.

2) Nun ni haltu ĉe Georgo Viktoro Figulus, pranepo el la oka generacio de Komenský, ĉar tiu vivis jam en la dua duono de la deknaŭa kaj en la dudeka jarcentoj. Li naskiĝis kiel filode kuracisto 21/1 1858 en Frankenstein en la prusa Silezio, proksime de la ĉeĥa limo. Ĉi tiu teritorio apartenas hodiaŭ al Pollando. Kiam li estis dudekdujara, li decidiĝis forveturi en la sudan Afrikon, kiu tiam logis aventurulojn de la tuta mondo per siaj trovoj de oro kaj diamantoj. Ĝi allogis eĉ junan Figuluson. La ŝipo sur la vojo dufoje frakasiĝis kaj tiel Figulus nur post grandaj obstakloj atingis bordojn de la suda Afriko. Kuraĝe li ĵetiĝis en laboron en fremda medio. Li ŝanĝis multajn profesiojn nur por vivteni sin. Li estis ne nur orministo kaj serĉanto de diamantoj, sed dumtempe kaj laŭ cirkonstancoj ankaŭ farmobienulo, maŝinisto, komercisto, policano, eĉ ankaŭ soldato. En la lando tiam vivis tri nacioj: aŭtoĥtonoj – negroj, poste buroj, t.e. posteuloj de nederlandaj enmigrintoj, kaj fine angloj. Inter buroj kaj angloj estis senĉesaj konfliktoj. Figulus simpatiis kun buroj kaj pli malfrue li aliĝis en buran armeon. Tie li rapide avancis kaj fine fariĝis kapitano kaj baterikomandanto. En milito, kiu pli poste estiĝis, estis angloj dufoje venkitaj. Sed trian fojon ili mobilizis grandegajn armeajn fortojn, kontraŭ kiuj buroj kiel malgranda nacio ne kapablis sin defendi. Tuj post kelkaj tagoj de la tria milito estis Figulus en persista batalo grave vundita en vizaĝon sub okulon, senkonsciiĝis kaj estis de angloj kaptita. Angloj forveturigis ĉiujn militkaptitojn al la insulo de Sankta Heleno, kie troviĝis granda koncentrejo de militkaptitoj. Tie antaŭ okdek jaroj mortis Napoleono Bonaparte same kiel angla militkaptito. Post du jaroj la milito pacfiniĝis, buroj subiĝis kaj Figulus revenis hejmen. Li havis tute nenion kaj komencis denove – jam sesafoje – serĉi okupon. Dum kurta tempo li ŝparkolektis kelkan monon, aĉetis al si propran domon, en kiun li enkondukis kiel edzinon sian samlandaninon el prusa Silezio. Pri ŝi ni nur scias, ke ŝi nomiĝis Emilia kaj ke ŝi estis verŝajne Germanino. En la jaro 1912 naskiĝis al ili filino Gertruda Viktoria, kurte Gerta, nomata tiel laŭ la fratino de Figulus mortinta du jarojn antaŭe.

Tuj post la unua mondmilito ricevis Figulus el Germanujo – kiel unusola vira posteulo de Komenský el la branĉo de Figulus – jam menciita multvaloran platenan ringon.

Figulus krome havis portreton de Komenský, kiun li heredis de sia patro, kaj apartan familian kronikon. Ambaŭ ĉi tiujn memorarojn li tre konscie kaj serioze prizorgadis.

Baldaŭ poste legis Figulus en ia sudafrika gazeto artikolon pri nova ŝtato en la meza Eŭropo – pri Ĉeĥoslovakio – kaj inter eminentaj anoj de la ĉeĥa nacio li trovis ankaŭ la nomon de Komenský. Li ligis tuj kontakton kun la societo "Ĉeĥa nacia societo en la suda Afriko", kiu kunigis niajn samlandanojn el Ĉeĥoslovakio. Tiuj lin protektis kaj aranĝis ĉion bezonan, por ke nia nacio

sciĝu pri Figulus. Post longa hezitado kaj pripensado, post interkonsento kun samlandanoj kaj kun la familio li fine decidiĝis, ke li forveturos al Ĉeĥoslovakio, ke li kunprenos la ringon kaj pluajn dokumentojn, kiel ankaŭ sian naŭjaran filineton Gerta. Ĉi tion li baldaŭ realigis. Do ili ambaŭ alveturis al Prago en junio 1921, ĝuste kiam la ĉeĥa nacio preparadis sin al trista rememoro okaze de tricenta datreveno de ekzekuto de dudek sep ĉeĥaj reprezentantoj sur la praga Malnovurba placo. Ĉeĥoslovaka nacia konsilantaro fariĝis protektanto de ili ambaŭ kaj prenis en deponon la ringon. Tuj unuan tagon ambaŭ partoprenis la funebran solenon sur la Malnovurba placo, kie sinjorino Renata Tyršová publike promesis, ke ŝi prizorgos edukadon de malgranda Gerta. Tiu vizitis ĉeĥajn lernejojn en Prago kaj poste en Olomouc en Pöttingeum.

Post sesmonata restado en Ĉeĥoslovakio, kiam Figulus certigis ĉion bezonan por la infano, li decidiĝis reveturi al la suda Afriko. Sed li estis trompita. Li ne trovis plu en la suda Afriko sian estintan hejmon. Li venis tiel en novan krizon, ĉi-kaze en la propra familio. Pro tio li, kiel elirejon el la krizo, akceptis proponon de siaj novaj pragaj amikoj, ke li revenu kaj daŭre ekloĝu en Prago. Do aŭtune 1922 – post naŭmonata restado en la suda Afriko – li forveturis duan fojon en Ĉeĥoslovakion, ĉifoje jam por ĉiam. Ĉeĥoslovaka nacia konsilantaro senĉese prizorgis lin kaj la malgrandan Gertan, kiu tre rapide ellernis la ĉeĥan lingvon. Figulus mem posedis tri lingvojn. Li parolis germane, nederlande kaj angle. Fine li ellernis kontentige ankaŭ ĉeĥe. Ministerio de komerco dungis lin kiel konsilanton pro liaj sperteco kaj kapableco. Ambaŭ fariĝis ĉeĥoslovakaj ŝtataj civitanoj kaj malrapide kunkreskadis kun ĉeĥa medio. Figulus propre ĉiam sentis sin kiel ĉeĥo malgraŭ tio, ke en la familio de lia patro oni parolis jam nur germane. Figulus ŝajne vivis per familiaj tradicioj tenataj, konservataj preskaŭ tricent jarojn, per ok generacioj.

Somere en la jaro 1927 li vizitis kun Gerta Moravion, ĉiujn lokojn, kie Komenský vivis, laboris kaj sin kaŝadis post la blankmonta katastrofo. Sed survoje li malvarmumis kaj baldaŭ post la reveno al Prago li subite mortis pro pneŭmonio 27/7/1927 en aĝo preskaŭ 70 jaroj. Gerta estis tiam nur dekkvinjara kaj pro tio la ringo restis en depono ĉe la Ĉeĥoslovaka nacia konsilantaro.

3) Kun Gerta Figulusová ni, t.e. mia edzino kaj mi, renkontiĝis unuafoje dum la ekskurso en Jugoslavio en julio 1933. Ŝi estis tiam dudekunujara kaj ĝuste finis studadon. Mi mem tiam fotografis ŝin. Tiel ŝi aspektis (Montri la fotografajon).

Reveninte Pragon ŝi eniris aŭtune 1933 sian unuan okupon kiel instruistino kaj loĝis en subluo tre proksime de ni en Prago-Žižkov. Ĉe ni ŝi estis ofta gasto. Unufoje en semajno ŝi restadis ĉe ni tutan tagon. Kun mia edzino ŝi kudris, kuiris, babilis ktp. Ambaŭ estis bonaj amikinoj. Pri sia patrino Gerta multe ne parolis. Pli eble pri sia nebridebla infanaĝo, kiun ŝi pasigis en la suda Afriko, en tiea sovaĝa naturo.

Foje ŝi rakontis al ni, ke en Prago estas ĝuste Nederlandanoj kaj ke ili intencas aĉeti de ŝi la platenan ringon. Gerta estis tiam jam plenaĝa, sed ankoraŭ ne sperta. Ŝi hezitis. Ni timis, ke ŝi povus la ringon de Ĉeĥoslovaka nacia konsilantaro elpostuli kaj vendi ĝin fremdlanden. Sed tio malakordus kun la deziro de Komenský kiel ankaŭ kun la tradicioj de la familio kaj interesoj de ĉeĥa nacio. Pro tio mi plu ne atendis kaj tuj vizitis direktoron de la Ĉeĥoslovaka nacia konsilantaro Seifert kaj atentigis lin pri la danĝero. Tiu promesis al mi, ke li entreprenos bezonajn dispoziciojn. Mi ne sciis jam, kio poste okazis; nur tio estas certa, ke la ringo restis en Prago.

Kiam ni post pli ol unu jaro transloĝiĝis el Žižkov en la internan Pragon, Gerta iradis plue al ni, sed jam ne tiel ofte, kiel antaŭe.

Foje ŝi diris al ni, ke ŝi estas anino de Unuiĝo de Fratoj. Tio ja ne estis nuna oficiala eklezio nomata evangelia eklezio ĉeĥofrata (Evangelická církev českobratrská), sed memstara evangelia sekto, kiu transprenis statuton de Unuiĝo de Fratoj el la tempo de Komenský, do ia originala Unuiĝo de Fratoj. Ĉi tiu sekto estis de la ŝtato agnoskita, sed ĝi havis nur malmulte da membroj.

En ĉi tiu eklezio Gerta konatiĝis kun familio Kallik, kiu posedis en Prago-Karlín malgrandan produktadon de meblaro; kaj printempe de la jaro 1939 ŝi edziniĝis al la plej aĝa filo de ĉi tiu familio, Ferdinando Kallik. En la ĵurnalo "Národní politika" estis tiam juna paro reproduktita, kiel ili eliras el la malnovurba urbodomo (staroměstská radnice) en Prago post edziga ceremonio, kiun gvidis tiama praga primatoro Dr. Otakar Klapka. Tiu estis pli malfrue de la faŝistoj arestita kaj

ekzekutita.

Kiam al Gerta naskiĝis filo, ŝi informis pri tio – ankoraŭ el sanatorio – skribe mian edzinon kun aldono, ke fileto eble nomiĝos Ferdinando kiel lia patro. Samfoje ŝi invitis kaj petis mian edzinon viziti ŝin. Originalon de ĉi tiu letero mi ankoraŭ havas. Mia edzino fakte vizitis ŝin, sed persvadis ŝin, ke ŝi ne donu al la fileto la antaŭnomon Ferdinando, ĉar ĉi tiu nomo havas ĉe ni malbonan sonon. Ĉiu ĉe ni tuj rememoriĝas pri Habsburgoj Ferdinando la dua kaj Ferdinando la tria, kiuj tiom kulpiĝis kontraŭ nia nacio eĉ kontraŭ Komenský mem. Ŝi rekomendis al Gerta, ke ŝi donu al infano antaŭnomon Jan, t.e. Johano laŭ sia fama praavo. Gerta kaj ŝia edzo konsentis, tiel la estonta (aŭ la nuna) posedanto de la ringo nomiĝas Jan (Johano).

Dum la jaro 1940 skribis Gerta al mia edzino du belajn leterojn, kiuj koncernas familiajn aferojn. Ni havas ĉiujn tri leterojn originale.

Foje en marto 1941 venis Gerta al ni kun sia fileto, kunportis fotoaparaton kaj proponis al mia edzino, ke ŝi elfotografos ie ekstere sian fileton kune kun nia je kelkaj monatoj pli juna filo Vlastimil. Tio ankaŭ tuj okazis ĉe la monumento de Palacký proksime de nia loĝejo. Gerta ilin fotografis. Sur la fotografaĵo, kiun ŝi poste transdonis al ni (montri ĝin!), estas mia edzino, malgranda Johano kaj nia Vlastimil, ankoraŭ en infanĉareto. Sur ĝi estas do lia estonta (eble hodiaŭ jam nuna) posedanto de la ringo aĝa tiam pli ol unu jaron. Hodiaŭ li estas jam trideksesjara.

Dum la dua mondmilito venadis Gerta ofte al ni kun siaj infanoj. Nome en la jaro 1944 naskiĝis al ŝi ankoraŭ filino Jarmila.

Ĉio ĉi tamen ĉesis fine de la jaro 1946, kiam ni transloĝiĝis el Prago al Brno. Sekve de tio ni ne vizitis nin plu, eĉ ne korespondis. Ambaŭ familioj havis evidente multon de siaj pli propraj zorgoj. Pri Gerta, ŝiaj infanoj kaj pri la ringo ni de tiu tempo scias nenion. Ni ne scias nepre, ĉu Gerta vivas aŭ kie ŝi nun troviĝas. Laŭ gazetaj informoj ŝi vivas en Johanesburgo en la suda Afriko ("Lidová demokracie" de 23/3/1970); laŭ aliaj gazetaj informoj ("Lidová demokracie" de 8/9/1970) ŝi vivas en Kalifornio, en Nova Ameriko.

Kiel mi malpli frue konstatis, ŝi vizitis en la jaro 1958 Ĉeĥoslovakion, Moravion. Ni tion bedaŭrinde ne sciis kaj pro tio ne renkontiĝis kun ŝi. Ĉi okaze ŝi laŭdire proklamis, ke la ringon de Komenský heredos siatempe ŝia filo Johano. Se tio estas vera, eblas konkludi, ke ŝi la ringon tiam posedis, sed ke ĝi ne estis ĉe ni en Ĉeĥoslovakio. Kio okazis kun la ringo de tiu tempo, oni ne scias. Estas eble, eĉ verŝajne, ke Greta jam transdonis ĝin al sia filo Johano Kallik. Tiukaze estus la ringo jam en manoj de deka generacio de Komenský.

Ni tre bedaŭras, ke la ringo ne restis ĉe ni en Ĉeĥoslovakio, kien ĝi anstaŭ ĉio apartenus el kaŭzoj historiaj kaj moralaj.

Ni tamen kredas, ke ĝi denove ĉi tien estos redonita, kiel tio jam foje okazis post la unua mondmilito. Tiam la ringo vagis preskaŭ 300 jarojn en la mondo. Ni devus ĝin tiukaze severe gardi kaj ne permesi, ke ĝi denove forlasu iam nian respublikon.

Mi dankas al vi por atentemo.

Dr. Jan Podracký


Rimarkigo:

La prelegon prezentis d-ro Jan Podracký en la Esperantista klubo en Brno 11.11.1975 sub titolo "La platena ringo de Komenio". La manuskripto (skribita vere per mano) estis trovita en postlasaĵo de Zdeněk Hršel en decembro 2019, kiam ties filo Jan Hršel transdonis al M. Malovec 10 skatolojn kun diversaj materialoj de la patro. Sube estas ankoraŭ genealogia arbo de posteuloj de Komenio kaj vortareto.

(Miroslav Malovec, 11.12.2019)

I. Jan Amos Komenský
n. 1592, + 1970


1/ Magdalena Vizovská
+ 1622 morem v Přerově



2/ Dorota Cyrilová
+ 1648 v Lešně

3/ Jana Gajusová,
Komenského přežila

II. Alžběta n. 1630
Komenského přežila



Petr Figulus – Jablonský
n. 1618, + 1670



III.

Samuel,
n. 1654 v Glansku,

IV.

Jan,
n. 1696, + 1760,

V.

Samuel,
n. 1724, + 1771,

VI.

Karel Alexandr,
n. 1764, + 1833,

VII.

Dr. Theodor,
n 1813, + 1871 (lékař ve Frankensteinu)

VIII.

Jiří Viktor,
n. 1858, + 1927 v Praze,

IX.

(Gertruda, Viktorie)
Gerta Kalliková, roz. Figulusová
n. 1912

X.

Jan (Daniel) Kallik,
n. 1939

angoraj rilatoj
kava trunko de tlio
dezertigo
samaĝulo
aspiri ion
disputo
rifuĝejo
trafali
Unuiĝo de Fratoj
trudi
pesto
elmigrinto
indeco
protekti iun
eksperto
orministo
aŭtoĥtonoj
avanci
iom tondi
maldungi
Malnov-urba placo
Ĉeĥoslovaka nacia konsilantaro
funebra soleno
Blankmonto
pneŭmonio
nebridebla
subluo
malnov-urba urbodomo
edziga ceremonio
samfoje
infanĉareto

tísnnivé poměry
dutý kmen lípy
zpuštošení, poušť
vrstevník
bažiti, ucházeti se
pře, hádka, spor
útočiště, útulek
propadnout
Jednota Bratrská
nutit, vnucovat
mor
vystěhovalec
důstojnost
ujmout se, zastávat se
znalec
zlatokop
původní obyvatelé
postoupit, být povýšen
přistřihnout
vypovědět (ze služby)
Staroměstské náměstí
Čsl. národní rada
tryzna
Bílá hora
zápal plic
nezkrotný
podnájem
staroměstská radnice
oddavky
zároveň
(dětský) kočárek